Gledhill, Christopher. 2010. Frazeologio, kunokazemo kaj leksiko-gramatiko : La ekzemplo de predikato-komplemento esprimoj en Esperanto. Detlev Blanke & Ulrich Lins (red.) *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin.* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. pp. 323-338.

Christopher Gledhill

# Frazeologio, kunokazemo kaj leksiko-gramatiko: La ekzemplo de predikato-komplemento-esprimoj en Esperanto

## Resumo

Ĉi tiu artikolo esploras frazeologian fenomenon en Esperanto: predikato-komplemento-esprimoj, aŭ 'PK-esprimoj'. PK-esprimoj foje similas al simplaj predikatoj (*fari demandon = demandi, doni respondon = respondi, meti finon = fini,* ktp.), sed ili ne ĉiam havas la saman sencon kiel similaj esprimoj (*voĉdoni = ? doni voĉon, havi okazon = ? okazi*), kaj ofte fasko da paralelaj esprimoj kunekzistas en la sama lingvo (*fari, meti, levi, starigi + demandon*). Stilaj kaj morfologiaj ecoj certe klarigus la diferencojn inter tiuj variantoj. Sed ĉi tie mi intencas emfazi pluan faktoron: la principon de 'kunokazemo'. Laŭ tiu nocio, unue proponita de J.R. Firth (1957), ĉiu signo en la lingvo emas okazi en pli-malpli antaŭ-videblaj kaj antaŭ-konstruitaj sintagmoj, dum la senco de ĉiu signo dependas de la socia kaj sintagma kunteksto, en kiu parolantoj kutime uzas ĝin. Laŭ la sekvantoj de Firth, la kutimajn kuntekstojn de signoj oni nur efektive povas observi en granda tekstaro (aŭ 'korpuso'). Tamen, tiu ideo kontraŭas la tradician vidpunkton pri frazeologio. Ĉar se ĉiu signo okazas en regule observeblaj leksiko-gramatikaj ŝablonoj, oni povas sin demandi, ĉu utilas distingi inter la 'frazeologiaĵoj' proponitaj de leksikologoj, kaj la pli prozaj sed ankaŭ produktivaj parolturnoj, kiujn oni trovas en ĉiuj aŭtentaj tekstoj.

## 1 Enkonduko

Ĉu esprimoj en Esperanto evoluas samkiel en aliaj lingvoj? Dasgupta (1993) kaj Fiedler (1998, 1999, 2002) respondis jese al tiu demando, montrante ke idiomaĵoj, parolturnoj kaj aliaj 'frazeologiaĵoj' ne nur ekzistas en Esperanto, sed abundas kaj disvolviĝas kiel en ĉiuj aliaj lingvoj. Tamen, en ĉi tiu artikolo mi esploras tiun problemon laŭ alternativa vidpunkto. Pli specife, mi adoptas du fundamentajn principojn de la brita 'funkciista' skolo de lingvistiko, specife la nociojn de (i) 'kunokazemo' (angle: *collocation*), proponita de la unua profesoro pri lingvistiko en Britio J.R. Firth (1957, 1968), kaj (ii) 'leksiko-gramatiko', proponita de la ĉefa sekvanto de Firth, M.A.K. Halliday (1985 / 2004). En la venontaj sekcioj, mi klarigos ambaŭ ideojn. Sufiĉas indiki nun, ke ambaŭ terminoj referencas al lingvaj fenomenoj, kiuj estas multe pli ĝeneralaj ol la 'idiomaĵoj', kiujn lingvistoj tradicie studas.

Krom tiu specifa teoria punkto, la ĝenerala celo de ĉi tiu artikolo estas esplori la fenomenon de predikato-komplemento-esprimoj, t.e. sintagmoj kun ĝeneral-senca predikato kaj pli specifa komplemento, kiu desegnas aŭ precizigas la semantikan procezon de la tuta predikato: ekz. *doni respondon, fari demandon, havi okazon, meti finon, preni en konsideron,* ktp. Ekzistas centoj da studoj pri PK-esprimoj en kaj pri diversaj lingvoj (ekz. Allerton 2002 pri la angla, Gross 2005 pri la franca, Storrer 2006 pri la germana, inter aliaj). Tamen, laŭ mia kono, oni ne jam profunde studis PK-esprimojn en Esperanto. La fenomeno eĉ ne menciiĝas

en la plej ampleksa gramatiko de la lingvo (Kalocsay/Waringhien 1985). Sed eble tio ne estas granda surprizo: frazeologio estas ankoraŭ relative marĝena fako, eĉ en la ĝenerala lingvistiko, kaj studoj pri frazeologiaĵoj en Esperanto ne abundas. Krom kelkaj studoj pri frazeologio en literatura kreado (Lo Jacomo 1981), proverbaroj kaj esprimaroj (ekz. Woolf 1969/1982), aŭ klasifikaj studoj pri idiomaĵoj (Mjasnikov 1989, Dasgupta 1993, Fiedler 1998, 1999, 2002), ne ekzistas studoj pri Esperanta frazeologio el la priskriba vidpunkto de 'korpus-lingvistiko', nek el la teoria vidpunkto de la skolo de Firth kaj Halliday. En antaŭaj studoj (Gledhill 1998/2000; 2008b), mi provis respondi al tiuj mankoj. Pli precize, mi ekspluatis elektronikan tekstaron (aŭ 'korpuson') por prezenti informojn pri la tipa uzado ne nur de tradiciaj frazeologiaĵoj, sed ankaŭ pli produktivaj 'leksiko-gramatikaj' ŝablonoj. Mi ankaŭ prezentis skizan priskribon de Esperanto laŭ la 'sistema funkcia' modelo de Halliday (1985, 2004). Ĉi-foje mi do esploras pli specifan fenomenon el la sama metoda kaj teoria perspektivo.

## 2 Frazeologio kaj kunokazemo

En Esperanto, la termino 'frazeologio' kutime rilatas al esprimoj, idiomaĵoj, kliŝoj, parolturnoj, proverboj, kaj aliaj sinsekvoj da signoj, kiuj konsistigas la kernan, rutinan frazaron kaj kulturan referencaron de iu lingvo-komunumo. Jen kelkaj ekzemploj menciitaj en Gledhill (1998 / 2000): *fina venko, finfine, iri glate, grandanima, kredu min sinjorino, knedu min sinjorino, krokodilaj larmoj*,... sen paroli pri zamenhofeskaj kalemburoj kaj rimoj: *granda frakaso en malgranda glaso,* ktp. La tradicia nocio de frazeologio supozas, ke idiomaĵoj ne estas 'laŭvorte tradukeblaj' (Woolf 1969 / 1982). Sed tio estas iom cirkla difino, kaj multaj lingvistoj preferas emfazi, ke idiomaj esprimoj havas du apartajn trajtojn:

(i) pli-malpli 'fiksitan' leksiko-sintaksan strukturon (kie oni ne facile interŝanĝas aŭ reordigas la leksikajn kaj gramatikajn erojn, ekz. *ne ŝovu la nazon en fremdan vazon* > ?*en fremdan vazon ne estu ŝovita via nazo,* > ?*ne ŝovu vian rinon en alies vinon*),

(ii) pli-malpli 'opakan' semantikon (kie oni ne rekte divenas la sencon de sintagmo el ties frazeroj: ekz. la senco 'mortis' kiun oni intencas per *falis tomben, forpasis, iris ĉielen...*).

Tamen, mi antaŭe argumentis kun mia franca kunlaboranto (Gledhill / Frath 2005, 2007), ke la tradiciaj kriterioj de 'fiksiteco' kaj 'opakeco' ne tiel utilas. Unue, el vidpunkto de gramatikistoj pli ol leksikologoj, ni konsideras, ke lingva modelo devas trakti ne nur ekzotajn 'idiotismojn', sed ankaŭ pli produktivajn formulojn, kiujn oni rutine renkontas en ĉiuj tekstoj. Due, ni opinias, ke la tradicia difino de frazeologio estas tro ekskluziva. Kiel mi sugestos en la sekvantaj sekcioj, ĉiu signo havas sian propran frazeologian profilon, kaj obeas al la ĝeneralaj principoj, kiujn oni nomas 'kunokazemo' kaj 'leksiko-gramatiko'. Tamen, kiam esperantistoj referencas al la frazeologio de Esperanto, ili ofte nur referencas al la proverbaro de Zamenhof kaj kelkaj aliaj fundamentaj verkistoj: la 'Esperanta esprimaro' estus do kanona, privilegiita listo. Sed la nocio de frazeologio, kiun mi proponas ĉi tie, celas multe pli vastan principon pri la ĉiutagaj parolkutimoj de la tuta lingvo-komunumo. Fakte, oni efektive aludas tion en la *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (PIV): '[Frazeologio] Frazaranĝo propra al iu lingvo aŭ al iu lingvouzanto' (Waringhien/Duc Goninaz 2002:366). Tiu difino havas la avantaĝon mencii la lingvo-specifan aspekton de ĉiutaga frazeologio, sed ankaŭ substrekas la ne-fiksitan, socian funkcion de frazeologio kiel spegulon de la komunaj, sed ankaŭ konstante evoluantaj pens- kaj parol-manieroj de homa grupo. Frazeologio do ne respondas al aro da esprimoj: ĝi estas centra principo pri la kutima aranĝo de signoj en sintagmoj.

Por fondi alternativan perspektivon pri frazeologio, oni devas reveni al kelkaj bazaj konceptoj de la lingvistiko. Oni scias, ke laŭ la klasika versio de la strukturismo (Saussure 1916), la 'signifo' de signo dependas ekskluzive de la specifa aranĝo de signoj en la abstrakta sistemo de la 'lingvo' (la *langue* laŭ Saussure). La organiza principo de tiu sistemo estas la 'asocia rilato' aŭ 'paradigmo'; hierarkio en kiu signoj (ankaŭ 'terminoj') estas difinitaj laŭ du principoj: la loko, kiun ili okupas en la sistemo, kaj la taksonomaj rilatoj, kiujn ĉiu signo havas kun la aliaj signoj en la sistemo. Tia intuicie klara nocio tamen ne klarigas, kiel sintagmoj kontribuas al signifo, nek kiel signoj interagas en sintagmoj. La problemo originas en la fakto, ke laŭ Saussure, sintagmoj (en la senco de 'sinsekvoj da signoj') havas la saman statuson kiel simplaj signoj:

> Kutime, ni ne parolas per izolitaj signoj sed per grupoj da signoj, organizitaj aroj, kiuj estas ankaŭ signoj. (Saussure 1916 : 177 )[1]

Por Saussure estas do malfacile klarigi, kiel oni povas krei signifojn per la kombinado de signoj en sintagmojn. Alidire: en iu sinsekvo da signoj, kiuj elementoj dependas de la *lingvo* (la abstrakta regularo, la virtuala lingva sistemo) aŭ de la *parolo* (la efektiviĝanta, praktika lingva realo)? Jen kiel diras tion Saussure :

> [...] ni devas rekoni, kiam temas pri la sintagmo, ke ne estas absoluta limo inter la *lingvo,* aspekto de la lingvokomunumo, kaj la *parolo,* kiu dependas de la individua libereco [...] En amaso da ekzemploj malfacilas klasifiki la kombinadon de unuoj, ĉar ambaŭ faktoroj kontribuas al la efektivigo de iu frazo, kaj en proporcioj kiuj estas malfacile determineblaj. (Saussure 1916 : 173)

La problemo levita de Saussure estas duobla: (i) kio estas la rilato inter signo kaj sintagmo? kaj (ii) ĉu la signifo de sintagmo estas simple la rezulto de la 'kombinado de signoj'?

Interesan respondon donis al tiuj demandoj la brita lingvisto John Rupert Firth (1957). Laŭ Firth, signoj nepre ne kombiniĝas libere, kaj la signifo de sintagmo ne estas la rezulto de la 'artimetika' kombinado de signoj. Anstataŭe, ĉiu signo obeas al la principo de la **kunokazemo**.[2] Laŭ tiu principo, ĉiuj anoj de lingvo-komunumo emas uzi signojn en pli-malpli antaŭ-konstruitaj kaj antaŭ-videblaj kuntekstoj. Per 'antaŭ-konstruita' mi celas, ke signoj kutime okazas kaj reokazas en simil-kuntekstaj sinsekvoj da signoj (ekz. *ĵeti rigardon... hunda rigardo..., rabia hundo,* ktp). Kaj per 'antaŭ-videbla' mi celas, ke la senco de re-okazanta sinsekvo da signoj kutime referencas al konvencia komunika funkcio (por nur citi tre simplajn retorikajn sinsekvojn: *bonan manĝon! kiel vi? je via sano!* ktp.) Oni notu, ke kvankam mi parolas pri 'antaŭ-konstruita' formo kaj 'antaŭ-videbla' funkcio, mi ne parolas pri frazeologio kiel ekskluziva aro da 'fiksitaj' frazoj aŭ 'opakaj' esprimoj: mi parolas pri ĉiu signo kaj ĉiu sintagmo de la lingvo. Ĉiu kombinado de signoj, ĉu ĝi estas malnova proza kliŝo aŭ nova poezia kreaĵo, dependas de la jam ekzistantaj sinsekvoj, kiujn ni devas lerni por fariĝi fluaj lingvo-uzantoj. Tial ne ekzistas, laŭ Firth, absolute originala kunmetaĵo aŭ kunokazaĵo. Ĉar eĉ se ni provas krei novan sinsekvon da signoj, nia kutima lingvo-sento igas nin aranĝi kaj interpreti la komponaĵon 'kadre de' la ekzistantaj sintagmaj modeloj, kiujn ni jam konas. Jen kiel diras tion Firth:

> Vortojn oni ne devus trakti kiel ili havus izolajn sencojn kaj okazus kaj uziĝus en libera distribuado. (Firth 1968b : 18).

---

[1]Ĉiuj esperantigoj de citaĵoj estas miaj –CG.

[2] Mi preferas uzi la terminojn 'kunokazemo' kaj 'kunokazaĵo' prefere al neologismo kiel 'kolokacio' (angle kaj france *collocation,* germane *Kollokation*).

La senco de signo do dependas de la kutima kunteksto de uzado de tiu signo. Ekzemple, la verbo *bati* havas multajn sencojn, sed en la sintagmo *bati retreton* ĝi referencas specife al son-signalo ordonanta 'retro-iron'. Pli ĝenerale, oni povas distingi inter la tipaj **kunokazaĵoj** de iu signo, t.e. la leksikaj signoj, kiuj kutime okazas ie en la apuda kunteksto de la vorto, kaj la tipaj **konstruaĵoj** de iu signo, t.e. la gramatikaj sintagmoj, en kiuj la signo kutime aperas. Tiel oni povas montri, ke la tipaj kunokazaĵoj kaj konstruaĵoj de la signoj *bati* kaj *retreto* kontribuas al la signifo de la sintagmo. En mia tekstaro[3] *bati* kiel transitiva predikato havas du tipajn kuntekstojn de uzado: (i) frapi por venki aŭ shanĝi estaĵon aŭ parton de estaĵo: *bati* + *filon, homon, hundon, lin, mulon, ŝin, unu la alian… bati* + *dorson, kapon, korpon, al ŝi la piedojn, vizaĵon…* (ii) frapi por krei efikon, bruon aŭ moviĝon: *bati* + *al si la bruston, flugilon, ŝtonon, tablon*, *tamburon*, *teron*, *tintilon*. Ankaŭ la signo *retreto* havas du kutimajn kuntekstojn (sen mencii, por la momento, la verbon: *retreti*): (i) milita manovro, kiun oni ebligas aŭ malebligas: *fari, haltigi, komenci, kontroli, kovri, malebligi, ŝirmi* + *retreton,* kaj (ii) milita aŭ metafora manovro, kiun oni ordonas: *ordoni, postuli, provoki, soni,* + *retreton.* Evidente, la signoj en la sintagmo *bati retreton,* rilatas en ambaŭ kazoj al la dua serio da kunokazaĵoj.

Tamen, oni ne vere povus kompreni la signifon de vorto kiel *bati*, se oni nur konsiderus la tipajn kunokazaĵojn de tiu signo. Por doni al si pli ĝustan ideon, oni devas kompari la signon kun simila vorto, ekzemple *frapi*. Oni tiel povas konstati, ke la tipaj komplementoj de *bati* estas tre specifaj kompare kun *frapi*: (i) atingi objekton aŭ parton de objekto: *frapi* + *branĉon, flankon, plafonon, pordon, ŝipon,* (ii) shanĝi ies percepton: *frapi* + *animon, atenton, konscion, okulon, orelojn*. Notindas ankaŭ, ke ambaŭ verboj uziĝas kun *per* kiel prepozitiva adjekto, sed *bati* pli ofte kun aĵo aŭ agado: *bati per* + *armilo, bastono, martelo, pacaj rimedoj,* dum *frapi* pli ofte kun korperoj: *frapi per* + *fingroj, mano, manplato, piedo, pugno*. Simile, la subjektoj de *bati* estas fenomenoj, kiuj agas kun natura ritmo: *flamo, fulmo, horo, horloĝo, koro, ondo, pluvo* + *batas, batis,* dum la tipaj subjektoj de *frapi* estas personoj aŭ perceptoj: *agonio, ideo, iu, oni, teruro* + *frapas, frapis*.

Kompreneble, la tipaj kuntekstoj de la verboj *bati* kaj *frapi* nepre ne estas fiksitaj, nek ekskluzivaj: oni ja rajtas diri ekzemple kaj *bati pordon* kaj *frapi pordon*. Sed oni nur komprenas la kromsignifojn de tiuj ekzemploj, se oni konas la tipajn kuntekstojn de ambaŭ verboj. Oni *batas pordon* por frakasi ĝin aŭ por fari grandan bruon, dum oni *frapas pordon* kutime por ĝentile peti la rajton eniri. Simile, oni facile komprenas kiel oni povas *bati retreton* (oni *batas tamburon* por signi realan aŭ metaforan *retreton*), sed oni ne tuj komprenas, kial oni povus *frapi retreton* (krom por efektivigi militan manovron). Tiaj ekzemploj montras, ke la kutimaj kuntekstoj de signoj gvidas nian interpretadon ne nur de kutimaj kunokazaĵoj (*bati hundon, bati tamburon, frapi animon, frapi pordon*), sed ankaŭ de pli nekutimaj kunokazaĵoj (*bati pordon, frapi retreton*). Resume, la signifo de la signoj *bati* kaj *frapi* ne dependas de memstaraj signoj en virtuala sistemo, sed de iliaj kutimaj kuntekstoj.

Fine, endas noti ĉi tie, ke la nocio 'kunokazemo' ne respondas, kiel lingvistoj foje supozas, al formala sinsekvo da unuoj aŭ klaso de idiomaĵoj. Kunokazemo laŭ Firth respondas al prefero ne pri formo de vortoj, sed pri funkcio, t.e. la maniero, kiel oni interpretas la rilaton inter la signo kaj diversaj aspektoj de ĝia 'kunteksto'. Adoptante ideojn de la pola antropologo Bronisław Malinowski, Firth rekonis almenaŭ tri tipojn de kunteskta rilato, kiuj rolas en lingva uzado: (i) 'sintagma kunteksto', la rilato inter signo kaj ties najbaraj signoj en ĉirkaŭa teksto, (ii) 'sistema kunteksto', la rilato inter signo kaj ties kutima uzado en la lingvo, kaj (iii) 'situacia kunteksto', la rilato inter signo kaj la nelingva medio. Tiuj tri tipoj

[3] Ĉi tie mi uzas 'sovaĝan korpuson', t.e. improvizitan kaj ne vere ekvilibran tekstaron de pli ol 2 milionoj da vortoj, respondantan plejparte al Esperantaj literaturo kaj ĵurnalismo.

de rilato respondas al la diversaj sencoj, kiujn lingvistoj celas, kiam ili uzas la terminojn 'kunokazaĵo', 'konstruaĵo' kaj 'konvencia esprimo'.

## 3 Frazeologio kaj leksiko-gramatiko

En la antaŭa sekcio mi proponis, ke frazeologio estas centra principo pri la kutima aranĝo de signoj en sintagmoj. Mi ankaŭ difinis 'kunokazemon' kiel la kutimon uzi signojn en 'antaŭ-konstruitaj' kaj 'antaŭ-videblaj' kuntekstoj. En ĉi tiu sekcio mi uzas la terminon **leksiko gramatiko** por referenci al la parenca ideo, unue proponita de la ĉefa sekvanto de Firth, Michael Halliday (1985), ke sintagmo ne estas memstara frazelemento, sed estas etendita en pli longa konstruaĵo (aŭ 'ŝablono') ol oni kutime konscias. Ekzemple, la verboj *bati* kaj *frapi* apartenas al familio de 'rezultigaj' verboj, kiuj permesas konstruaĵon kun plia atribua komplemento, ekz. *ili batis lin senkonscia, tiu homaĉo frapis min teren.* La termino 'leksiko-gramatika ŝablono' do referencas al sekvencoj, kiuj estas potence pli kompleksaj kaj nekontinuaj ol vorto-paroj kiel *bati + retreton, frapi + pordon*, aŭ esprimoj kiel *trafi du muŝojn per unu bato*.

En la resto de ĉi tiu sekcio mi esploras la leksiko-gramatikon de 'predikato-komplemento-esprimoj'. En antaŭaj studoj pri PK-esprimoj en la angla, franca kaj Esperanto (Gledhill 2008a, b), mi sugestis ĝeneralan distingon inter 'PK-konstruaĵoj' kaj 'PK-esprimoj'. PK-konstruaĵo simple estas sintagmo, kiu enhavas predikaton kaj komplementon. Tiu difino estas evidente larĝa, kaj ĝi inkluzivas ĉiujn el la sekvantaj ekzemploj (kiuj estas aŭtentaj, kaj venas en modifita formo de PIV aŭ de la Interreto):

| | (a) | (b) | (c) |
|---|---|---|---|
| (1) | Oni **batis** la **kapon** al li… | Al la popolo la romianoj **donis panon** kaj **cirkon**… | Unue mi **faris kukon,** bonan kukon… |
| (2) | La armeo **batis** strategian **retreton**… | Ĉu li **donis** al vi jesan **respondon**? | Vi **faris** vian **decidon**, vi elektis varbiĝi… |
| (3) | Kial vi **batas** la **pavimon?** | Bedaŭrinde 18% **donis voĉon** al la Nacia Fronto… | Ili **faris** sian **vojon** al Japanio… |

En la supra tabelo, ĉiu ekzemplo estas PK-konstruaĵo, sed nur kelkaj el ili estas PK-esprimoj. Sen fari kompletan analizon, oni povas komence noti, ke la ekzemploj (1) havas objektan komplementon, *kapon, panon, kukon,* t.e. objekto 'kreita' aŭ 'shanĝita' de la procezo esprimita en la predikato. Kontraste, en la dua serio da ekzemploj (2), la komplemento ne estas objekto; anstataŭe, ĝi desegnas aŭ etendas la specifan sencon de la predikato. En (2a), (2b) kaj (2c) la predikatoj esprimas signifojn proksimajn al la verboj *retreti, respondi* kaj *decidi.* Mi plu studos tiujn ekzemplojn en la sekvanta sekcio: sufiĉas noti ĉi tie, ke en (2b) kaj (2c) la semantika procezo ne estas tipo de *dono* aŭ *faro,* sed tipo de *respondo* aŭ *decido.* La ekzemplo *bati la retreton* estas iom pli komplika: ĉu oni referencas al la *batado* (la *signalo*) aŭ metonomie al la *retreto* de la armeo? La diferenco inter la litera kaj la intenca senco estas pli klara en la serio (3). En tiuj ekzemploj oni interpretas la sencon konvencie, kiel oni faras kun idiomaj esprimoj: (3a) *bati pavimon* similas al *gapvagi* ('sencele promeni interesiĝante pri strataj bagatelaĵoj' (laŭ la difino de la 'reta vortaro'[4]), (3b) *doni voĉon* similas al *voĉdoni* 'esprimi sian opinion ĉe decido aŭ elekto', kaj (3c) *fari vojon* similas al *vojiri* 'vojaĝi al dista celo, sen preciza maniero' (mia sugesto)[5]. Resume, la ekzemploj (1), (2) kaj (3) estas 'PK-

[4] La reta vortaro troviĝas ĉe la adreso: http://reta-vortaro.de/revo/. (1.5.09)

[5] La konstruaĵo *fari vojon* ŝajne similas al la esprimo *iri vojon* kiel en la ekzemplo: *Hu Jintao emfazis* iri vojon *de scienca disvolviĝado* (Ĉina Radio Internacia, 30 Nov 2008).

konstruaĵoj', kun predikato kaj komplemento. Sed samtempe la serioj (2) kaj (3) estas ankaŭ 'PK-esprimoj', t.e. sinsekvoj, kie la predikato kaj la komplemento formas strukture kompleksan sintagmon, sed funkcias semantike kiel simpla referenco al la sama procezo.

Mi konscias, ke multaj lingvistoj ne akceptus la distingon inter 'PK-konstruaĵoj' kaj 'PK-esprimoj'. Ĝenerale analizistoj klasifikas la ekzemplojn en la Tabelo (A) en tri tipojn, laŭ unu-dimensia gradiento, kiun oni nomas la 'frazeologia kontinuaĵo':

(1) 'liberaj kunokazaĵoj' > (2) 'limigitaj kunokazaĵoj' > (3) 'fiksitaj idiomaĵoj'

Leksikologoj probable konsiderus, ke nur la ekzemploj (3) estas legitimaj 'idiomaĵoj', dum la ekzemploj (2) estus eble sub-tipo de ne-idioma konstruaĵo. La nocion de 'frazeologia kontinuaĵo' fondis la ruslingvaj leksikologoj Vinogradov (1947, 1977) kaj Amosova (1963), kaj la ideo estas tre ĝenerale akceptita (Cowie 1981, Burger 1998, Ruiz 1998, Gonzalez-Rey 2002). Tiel, la fundamenta tasko de lingvisto, laŭ Howarth (1996), estus apartigi frazeologiajn unuojn el ĉiuj aliaj 'kombinoj' en la lingvo:

> Idiomaĵoj estas facile rekoneblaj kaj ne starigas seriozan problemon por priskribado, kvankam jam multe studis ilin leksikologoj kaj leksikografoj. Je la alia ekstremaĵo [de la kontinuaĵo] indas, por esti efika, forigi el nia priskribo ĉiujn ekzemplojn de kombinoj kies okazon oni povas simple klarigi per kutimaj gramatikaj kaj stilaj procezoj (Howarth 1996, 47).

Alidire, Howarth proponas, ke analizistoj ne devus interesiĝi pri 'libere komponitaj' kunokazaĵoj. Mi komprenas lian pozicion: leksikografoj efektive ne povas ĉion inkluzivi en vortaroj. Tamen, tiu restriktita vidpunkto igas Howarth postuli laŭ mi diskuteblan distingon inter 'liberaj' kunokazaĵoj (liaj ekzemploj estas en la angla: *go to school* 'iri al la lernejo'*,* *open a window* 'malfermi fenestron', kiuj laŭ Howarth estus 'laŭvortaj', do ne 'frazeologiaĵoj')*,* kaj 'limigitaj' kunokazaĵoj (kiel *take a vacation* 'ferii, fari ferion', kaj *meet the demand* 'kvitigi, respondi + demandon, mendon', kiuj esprimus laŭ Howarth pli 'figuran' sencon, kaj do estas 'frazeologiaĵoj') (1996:37). Kiel mi menciis antaŭe, oni povas argumenti kontraŭ la ideo, ke vere ekzistas 'liberaj' kunokazaĵoj. Kaj oni povas scivoli, kial estas necese aŭ utile aserti, ke *iri al lernejo* estas ne-frazeologia, kontraste al *kvitigi mendon*? Plie, la angla sintagmo *go to school* ne nur signifas *iri al lernejo* sed ankaŭ *ĉe-esti lernejon*. Ne estas facile scii, kial Howarth ne diskutas tiun inferencon. Tamen, la fakto, ke simpla sintagmo povas esti diverse interpretita, ŝajne kontraŭas la ideon, ke *go to school* estas 'litera' aŭ 'laŭvorta' (sed kion tio signifas? kiel oni mezurus tion?). Pli ĝenerale, ĉu 'metaforeco' kaj 'figureco' vere estas esencaj kriterioj por difini idiomecon? Tiaj demandoj eble kondukas nin for de nia temo, sed ili ja estas legitimaj, ĉar ili rilatas al ideoj ofte supozataj de analizistoj.

Resume, en ĉi tiu sekcio mi proponis ĝeneralan kadron por distingi inter PK-konstruaĵoj kaj PK-esprimoj. Tiu analizo certe diferencas de la tradicia koncepto de 'frazeologiaĵoj', kiuj nur respondas al sub-grupo de la potencialaj sinsekvoj de la lingvo. Sed anstataŭ postuli diversajn kategoriojn (formuloj, lokucioj, proverboj ktp), mi sugestas ĉi tie, ke ĉiu sinsekvo da signoj povas esti analizata laŭ du komplementaj perspektivoj: (i) el leksiko-gramatika vidpunkto oni povas konsideri ĉiun sinsekvon da signoj kiel relative antaŭ-konstruitan kaj antaŭ-videblan konstruaĵon, kaj (ii) el frazeologia vidpukto oni povas konsideri, ke certaj konstruaĵoj povas esti 'promociitaj' al la statuso de esprimoj: en tiu kazo la sintagmo funkcias kiel signo, ĉar ĝi aludas al konvencia ideo aŭ referenco.

Ĉar mi nun establis la ĉefajn distingojn de mia analizo (frazeologio – kunokazemo – leksiko-gramatiko, kunokazaĵo – konstruaĵo – konvencia esprimo), mi nun estas preta esplori pli detale la sub-grupon de konstruaĵoj, kiujn mi nomas 'PK-esprimoj'.

## 4 Predikato-Komplemento-esprimoj

Analizistoj kutime skizas la difinajn trajtojn de PK-esprimoj en formalaj aŭ strukturaj terminoj. Sube mi prezentas sintezon de la diversaj ecoj menciitaj en la gramatika literaturo. Unue oni substrekas la 'predikatan' (P1-4) konduton de PK-esprimoj:

P 1 **Ekivalento**. Kelkaj PK-esprimoj parencas al simplaj predikatoj (*rekomendi / fari rekomendon, retreti / fari, bati retreton*). Sed ekvivalentoj ne ĉiam troviĝas, nek estas tute samsignifaj (*doni voĉon =? voĉi, havi la okazon =? okazi.*)

P2 **Valento**. Kelkaj PK-esprimoj havas la samajn tipojn de argumentoj kiel simplaj predikatoj (*ĉu li donis al vi jesan respondon? / ĉu vi ricevis de li jesan respondon?*) Sed la valento de kelkaj esprimoj ne kongruas kun tiu de ekvivalenta predikato (*havi efikon sur iu =*? *efiki =*? *influi.*)

P 3 **Voĉo**. Kelkaj PK-esprimoj povas uziĝi kun pasiva voĉo, kvazaŭ la komplemento havus memstaran referencon (*ĉu li donis al vi jesan respondon? / ĉu jesa respondo estis donita?*) Sed tiu reformulo ne eblas en lokucioj, kie la komplemento iĝis parto de la verba sintagmo (*havi efikon, = ?, havi okazon = ?,* ktp.)

P 4 **Aspekto**. Kelkaj PK-esprimoj signas perfektivan aspekton, almenaŭ en lingvoj kiel la angla aŭ la franca (Wierzbicka 1982, Vivès 1984). En la angla aspekton oni povas ligi al la uzado (aŭ ne) de nedifina artikolo (*a, an*). Ekzemple: *she laughed* 'ŝi ridis' (senlima aspekto) / *she gave a laugh* 'ŝi faris ridon' (restrikta aspekto). La pruvo por tiu diferenco estas, ke oni pli facile diras *she laughed for two minutes* 'ŝi ridis du minutojn' ol ?*she gave a laugh for two minutes* 'ŝi faris ridon du minutojn'.

Dua serio da kriterioj (K1-4) emfazas la pli-malpli aŭtonoman konduton de la komplemento en PK-esprimoj:

K1 **Determinado**. En kelkaj PK-esprimoj, specife 'lokucioj', la uzado aŭ ne-uzado de artikolo estas deviga aŭ fiksita (*havi la rajton / ?havi rajton, meti finon / ?meti la finon*). Sed ŝajnas, ke tio estas tendenco pli ol regulo, almenaŭ en Esperanto. Cetere, en multaj ekzemploj la artikolo simple dependas de la ĉirkaŭa diskurso (*doni respondon / doni la respondon,* ktp).

K2 **Reformulado**. En kelkaj PK-esprimoj la komplemento povas iĝi subjekto aŭ pronomo (*mi laŭdas la decidon, kiun ili prenis*). En lokucioj, kie la komplemento estas pli fiksita, tio foje eblas (*mi laŭdas la efikon, kiun tiu medicino havas*), foje ne (*?mi laŭdas (la) finon, kiun ili metis al la milito.*)

K3 **Modifado**. En kelkaj PK-esprimoj la komplemento povas esti modifita, kaj tio ŝajnas esti tre produktiva funkcio de PK-esprimoj (*doni + apartan, , konstantan, urĝan + atenton.*). Ne ŝajnas al mi, tamen, ke tio multe eblas kun lokucioj (*fari sian devon, profiti la okazon,* ktp.).

K4 **Konvertado**. En kelkaj PK-esprimoj la predikato povas iĝi substantiva frazelemento, kiu konservas referencon al la komplemento (ofte kun prepozicio) (*la prenado de tujaj decidoj*). Samkiel K3 konvertado ne tiom eblas kun 'lokucioj' (*havi la devon, havi la okazon,* ktp.)

Studante ĉi tiun liston oni povas konkludi, ke fakte ne ekzistas unu struktura aŭ gramatika kriterio, kiu permesas establi homogenan kategorion de PK-esprimoj (tio ne nur estas mia opinio: vidu ekz. Pottelberge 2000). Kaj kvankam lingvistoj ofte mencias bone difinitan sub-grupon da PK-esprimoj (kiel la tre fiksitaj 'lokucioj'), ili ne kutime proponas manieron distingi pli ĝenerale inter PK-esprimoj kaj PK-konstruaĵoj. Plie, la ekzemploj ofte cititaj de analizistoj ne mencias alian kategorion de esprimoj, kiujn mi (kaj lingvistoj kiel Herrlitz 1973) konsideras parencaj, nome esprimojn kun adjekto, ekz. *preni en konsideron, preni serioze, veni al konkludo*. Mi devus aldone mencii ĉi tie, ke multaj lingvistoj asertas, de post Jespersen (1924), ke verboj kiel *bati, doni, fari* en PK-esprimoj estas 'malplenaj' aŭ 'sensignifaj' helpoverboj. Sed ekzistas multaj argumentoj por kontraŭi tion. Ekzemple, la kriterioj P1-4 efektive montras, ke la verbo en PK-esprimoj plene gardas sian sintaksan, predikatan funkcion. Simile, kiel Bolinger (1968) argumentis, la 'leĝeraj' verboj kiel *fari* en PK-esprimoj gardas percepteblan bazan sencon (kvazaŭ oni 'kreus' *demandon, decidon, vojon,* samkiel oni ''fabrikas' *kukon*). Simila rimarko aplikiĝus al la 'poseda' senco de *havi* (*efikon, kapablon, okazon,...*), la 'akira' senco de *preni* (*banon, decidon, paŭzon, en konsideron ...*), la 'transfera' senco de *doni* (*atenton, respondon, voĉon*) kaj aliaj ĝeneralaj predikatoj. Cetere, mi montros en la sekvantaj sekcioj, ke verboj en PK-esprimoj ofte havas kontrastan funkcion, kiu facile observeblas, kiam oni komparas similajn esprimojn, ekz. *fari demandon / starigi demandon, fari decidon / preni decidon*, ktp.

Mi sugestis en la supra paragrafo, ke multaj lingvistoj adoptas tro formalan, mekanikan kaj restriktan difinon de PK-esprimoj. En la sekvanta analizo mi do revenas al la funkcia difino proponita en la antaŭa sekcio kaj en Gledhill (2008a, 2008b): **predikato-komplemento-esprimoj** havas specifan komplementon (aŭ foje 'adjekton'), kiu desegnas aŭ etendas la semantikan procezon de la predikato. En la resto de ĉi tiu sekcio mi montras, kiel oni analizas PK-esprimojn laŭ la sistema funkcia modelo de Halliday. Kontraste al formalaj modeloj de sintakso, kiuj derivas propoziciojn el pli simplaj frazoj aŭ kernaj predikatoj, ĉi tiu modelo supozas, ke pluraj niveloj de analizo kontribuas samtempe, sed ankaŭ sendepende, al la signifo de mesaĝo. Ŝajnas, ke nur tri paralelaj niveloj de analizo sufiĉas por priskribi PK-esprimojn: i) sintaksa funkcio (adjekto, subjekto, predikato, komplemento), ii) leksika strukturo (modifanto, nodo, post-modifanto) kaj iii) semantika rolo (cirkonstancoj, procezo, partoprenantoj). Oni tiel povas analizi la frazojn (1a, 1b kaj 1c) (kun kelkaj simpligoj):

| (1a) | *Oni* | *batis* | *al [li]* | *la kapon* |
|---|---|---|---|---|
| Funkcio | S | P | K | K |
| Strukturo | N | N | N [N] | M N |
| Rolo | Aganto | Materia procezo | Ricevanto | Medio |

| (1b) | *Al [la popolo]* | *la romianoj* | *donis* | *panon kaj cirkon* |
|---|---|---|---|---|
| Funkcio | K | S | P | K |
| Strukturo | N [M N] | N | N | N N |
| Rolo | Ricevanto | Aganto | Materia procezo | Medio |

| (1c) | *Unue* | *mi* | *faris* | *kukon, belan kukon* |
|---|---|---|---|---|
| Funkcio | A | S | P | K |
| Strukturo | N | N | N | N P [M N] |
| Rolo | Cirkonstanco | Aganto | Materia procezo | Medio |

En ĉi tiuj ekzemploj, oni havas prototipan uzon de transitivaj predikatoj *bati, doni, fari.* Mankas spaco por komenti la analizon de la tradiciaj terminoj (ĉu prepozicio estas nodo aŭ modifanto?, ktp), nek diskuti pliajn nivelojn de la analizo, kiuj estus taŭgaj (ekz. je la nivelo

de ‘teksta strukturo’, kio estus la ‘temo’ kaj potenca ‘fokuso’?) Nur indas rimarkigi, ke la ĉefa nivelo, kiu permesas al ni distingi inter PK-konstruaĵoj kaj PK-esprimoj, estas tiu de la semantikaj roloj.
Je tiu nivelo, en (1a), (1b) kaj (1c) la predikato signifas ‘materian’ procezon: tio estas, procezo, kie subjekto havas la semantikan rolon de ‘aganto’ (kaŭzo, instiganto), kaj komplemento havas la rolon de ‘medio’ (shanĝita, afekciita aŭ kreita objekto). Oni povas kompari tiujn ekzemplojn kun frazo de la dua serio, ekzemple (2a):

| (2a) | *La armeo* | *Batis* | *strategian retreton* |
|---|---|---|---|
| Funkcio | S | P | K |
| Strukturo | M N | N | M N |
| Rolo | Aganto | Materia procezo | Etendiĝo |

Oni tuj konstatas, ke el strukura vidpunkto oni havas la saman analizon por PK-konstruaĵoj kaj PK-esprimoj. La sola diferenco estas, ke la komplemento en (2a) respondecas pri la tipo de procezo esprimata en la propozicio. En la sistemo de Halliday tiu rolo estas markita ‘etendiĝo’. **Etendiĝo** estas semantika rolo por frazelemento, kiu ne estas objekto modifita de la procezo, sed elemento kiu desegnas la procezon aŭ alimaniere etendas ĝian signifon. En (2a) la procezo estas sendube ‘materia’, sed sen plia kunteksto oni ne vere scias, ĉu temas pri sona *batado* aŭ moviĝa *retretado*. Tamen, en (2b) kaj (2c) (*doni respondon, fari decidon*) la situacio estas iom pli klara: la predikato esprimas ‘mensan’ procezon (tipo de *respondo*, tipo de *decido*). Laŭ la analiza sistemo de Halliday mensa procezo estas kategorio, kiu inkluzivas perceptadon, pensadon kaj komunikadon. La ĉefa gramatika testo por mensaj procezoj estas, ke ili kutime permesas komplementajn propoziciojn: *oni sentis, pensas, dirus, ke...* Mensaj procezoj havas alian serion da etikedoj por siaj semantikaj roloj (ekz. la subjekto ne plu ludas la rolon de ‘aganto’, sed ‘medio’, t.e. tiu, kiu perceptas mesaĝon aŭ fenomenon):

| (2b) | *Ĉu* | *li* | *donis* | *al [vi]* | *jesan respondon?* |
|---|---|---|---|---|---|
| Funkcio | A | S | P | K | K |
| Strukturo | N | N | N | N [N] | M N |
| Rolo | Modalo | Medio | Mensa procezo | Ricevanto | Etendiĝo |

| (2c) | *Vi* | *faris* | *vian decidon...* |
|---|---|---|---|
| Funkcio | S | P | K |
| Strukturo | N | N | M N |
| Rolo | Medio | Mensa procezo | Etendiĝo |

Fine, indas noti ĉi tie, ke la semantika rolo ‘etendiĝo’ respondas al diversaj tipoj de ekspansio de la predikato, specife: (i) ‘proceza ekspansio’, kie la proceza tipo estas indikita aŭ de predikativa komplemento (*bati la retreton, doni respondon, fari decidon*), aŭ de metonimia komplemento, kiu nur konvencie indikas la procezan tipon (*bati la pavimon, doni sian voĉon, fari sian vojon*), kaj (ii) ‘cirkonstanca ekspansio’, kie la proceza tipo estas esence esprimita de la predikato, sed modifita de la komplemento. La dua tipo de etendiĝo havas diversajn sub-tipojn,ekz. kvanta (*la horloĝo batis la kvaran, ili deklamis du poemojn, ili ludis unu matĉon*), kaj kvalita aŭ klasifika (*la birdo batis sian flugilon, ŝi kantis arion, li ludas rolludojn*).

## 5 Predikato-komplemento-esprimoj en Esperanto

En la antaŭa sekcio mi proponis ĝeneralan kadron por analizi PK-esprimojn. Ĉi tie mi turnas min al specifa analizo de PK-esprimoj en Esperanto. Tuj indas noti, ke PK-esprimoj en Esperanto ne havas la saman distribuon kaj funkcion kiel en aliaj lingvoj, eĉ tiuj, kiuj 'prunte donis' siajn vortojn al la Esperanta leksikono. Specife, la 'aglutina' leksika morfologio de Esperanto signifas, ke oni ofte formas simplan predikaton (el substantivo ktp) prefere al kompleksa esprimo kun verbo plus substantivo. Ekzemple, en la franca *avoir besoin* estas simple en Esperanto *bezoni.* Simile: *avoir peur = timi, avoir chaud = varmi*, *faire faillite = bankroti, faire semblant = ŝajnigi,* aŭ en la angla *have / make fun = sin amuzi / amuziĝi, make friends = amiki / amikiĝi, make love / have sex = amori / seksumi, make sense = pravi / prudenti,* ktp. Alia faktoro, kiu shanĝas la distribuon de PK-esprimoj en Esperanto, estas la fakto, ke oni ofte uzas du aŭ tri verbojn en Esperanto (*fari, havi,* kaj iom malpli produktive *doni*), prefere al pli diversaj verboj, kiujn oni trovas en aliaj lingvoj (*ĵeti, levi, meti, pagi, preni, tiri* ktp). Ekzemple, oni komparu la sekvantajn PK-esprimojn en la angla, la franca kaj Esperanto: *give a slap / donner un coup > fari baton, pay homage / rendre hommage > fari omaĝon, pay a visit / rendre visite > fari viziton, ask a question / poser une question > fari demandon...* Tiu restrikto ne signifas tamen, ke aliaj verboj ne uziĝas en PK-esprimoj en Esperanto (*ĵeti rigardon, levi demandon, meti + demandon, finon, punkton, preni + decidon, sindevigon, tiri + atenton, konkludon, pruvon,* ktp), aŭ ke PK-esprimoj maloftas en Esperantaj tekstoj. Kaj kiel mi montros malsupre, variantoj kiel *ebli / havi la eblecon* havas kontrastajn funkciojn, kiuj demonstras, ke novaj leksiko-gramatikaj ŝablonoj kaj regulaj kontrastoj konstante aperas en Esperanto.

En la sekvantaj sekcioj, mi indikos kelkajn el la plej tipaj leksiko-gramatikaj ŝablonoj, kiujn mi povas observi ĉirkaŭ la plej produktivaj verboj en mia tekstaro: *doni, fari* kaj *havi*.

### 5.1 PK-esprimoj kun la verbo *doni*

Mi jam menciis, ke la verbo *doni* estas uzata en PK-esprimoj kiel *doni respondon* kaj *doni (sian) voĉon.* Jen kelkaj aliaj tipaj esprimoj, kiujn mi trovas en la tekstaro:

1. mi estis malpli kapabla **doni atenton** al aliaj aferoj eventuale pli gravaj.
2. Tiberias proksime al la loko, kie oni manĝis la panon, post kiam la Sinjoro **donis dankon**.
3. poste mi revenos al ili kaj **donos la decidon** finan, ricevitan per la juĝo de l'publiko.
4. Ili **donas la senton** ke Esperanto-asocioj povas influi politikistojn kaj ĵurnalistojn kadre de bona kunlaboro.
5. "Nu, estu", diris la estro. "Igu **doni signon**, ke oni forlasu la remparojn...

Tiuj ekzemploj sugestas al mi, ke la kutima senco de la ŝablono *doni + -on* estas 'komuniki la rezulton de iu mensa procezo'. Unu el la plej elstaraj ekzemploj de tiu frazologio estas *doni la impreson*. Ĝia tipa leksiko-gramatika kunteksto kutime inkluzivas komplementan propozicion:

6. La kondiĉo de niaj edukitaj klasoj **donas la impreson, ke** ĉio kion ni faras haltiĝos se ni ĉesas la uzon de la angla.
7. Al mi tiu "oni" **donas la impreson, ke** homoj nenomataj suprenprenis lin.
8. Al psikologo ili **donas la impreson**, **ke** ili kompensas ion neelporteble vakuan, aŭ negativan.
9. ili **donas la impreson, ke** ili pli ŝatas ideojn kaj abstraktaĵojn (regulojn, principojn . . .) ol homojn.
10. Li tiel **donas la impreson, ke** nur li kaj la Analiza Skolo havas monopolon de la logiko.

Tamen ĉi tiuj ekzemploj kontrastas kun *doni + respondon* (kun aŭ sen artikolo), kiu ne ofte okazas kun komplementaj propozicioj. Simile, kiam oni komparas *doni respondon* kaj

*respondi*, oni konstatas, ke *doni respondon* signifas '*komuniki respondon*' sed sen precizigi, pri kio la *respondo* temas (tiu informo troviĝas en alia parto de la kunteksto):

11. Ni starigos niajn kondiĉojn al ĉiuj registaroj kaj ili **donu respondon** al siaj popoloj.
12. La Sorbono, invitita doni sian opinion, ne **donis respondon** decidan...
13. Ekster la respondo letera, ni poste **donos** al vi ankaŭ pli vastan **respondon** en nia gazeto.
14. Claude Piron **donis** la **respondon** en La Bona Lingvo.
15. Kaj ĝuste Dostojevskij pli ol aliaj povis **doni** la **respondon**.

Kontraste, la simpla predikato *respondi* estas uzata en dialogoj aŭ rakontaj situacioj, ofte akompanata de diraĵo en la proksima kunteksto:

16. Al li kontraŭe **respondis** Agamemnono, la ĉefo: "Kia ajn estas kuraĝa vi, diosimila Aĥilo, …
17. La ĉefkasisto **respondis**, ke li havas absolutan certecon pri la afero: ...
18. La Maljunulo tuj malleviĝis, la sulka vizaĝo rigidiĝis en dolora masko. - Mi ne scias, - grumble **respondis** li. - En la neŭtralaj akvoj, supozeble...
19. Sed la profesoro ne **respondis** per la atendita korvarmeco. "Malbone estus por instruisto de la dia arto medicino,"
20. "Oh, ne, kara Rozalio!" **respondis** rapide Emilio...

Tiaj ekzemploj klare montras la 'leksiko-gramatikan' principon de Halliday; tio estas, ke simpla predikato kiel *respondi* kaj etendita predikato kiel *doni respondon* ne estas entute sinonimaj, kaj ke por ambaŭ esprimoj evoluas du tre regularaj kuntekstoj de uzado en Esperanto.

## 5.2 PK-esprimoj kun la verbo *fari*

La verbo *fari* estas la plej produktiva verbo uzata en PK-esprimoj en Esperanto. Ĉiu el ties PK-esprimoj havas tre regularan leksiko-gramatikan konduton, kiu inkluzivas regularajn ŝablonojn en la ĉirkaŭa teksto. Ekzemple, multaj esprimoj havas prepozitivan sintagmon inter predikato kaj komplemento:

21. "Mi el nenio **faras** <u>al mi</u> **ĉagrenon**!" diris la ombro, "kaj tial mi grasiĝas..."
22. Via aparta letereto, en kiu vi komunikis al mi la peton de unu certa persono interrilatigi min kun li, **faris** <u>al mi</u> grandan **impreson**.
23. Antaŭ tri tagoj mi vizitis vian kuzon kaj mia vizito **faris** <u>al li</u> **plezuron**.
24. La instruon de Dio, ho mia filo, ne malŝatu, kaj ne deturnu vin, kiam Li **faras** <u>al vi</u> **punon**; 12. ĉar kiun Dio amas, tiun Li punas,...
25. mi vidis grandan nigran spiriton, kiu etendis la brakojn kaj **faris** <u>al mi</u> **signon** ne iri plu.

Kiam mi konsideras la tipajn sencojn de PK-esprimoj kun *fari,* mi trovas multjajn mensajn procezojn: *fari + diferencon, kalkulon, malkovron, konkludon, sugeston...* Sed la plej produktiva (sed ne necese altfrekvenca) ŝablono por *fari +on* rilatas al materiaj procezoj, kiuj ofte en la ĉirkaŭa teksto juĝitaj (*fari eraron, fiaskon*) aŭ modifitaj per kvantaj aŭ kvalitaj esprimoj:

26. Finfine, la malfeliĉa Akakij Akakijeviĉ **faris** <u>sian lastan</u> **elspiron** kaj mortis.
27. Peano **faras** <u>pioniran</u> **esploron** por matematika lingvistiko; li ne nur uzas la planlingvon LSF...
28. Nia literatura korifeo s-ano William AULD **faris** <u>grandan</u> **laboron**, kolektinte, krom la tri supremenciitajn poemarojn, ankaŭ multajn aliajn poemojn,
29. La forĝistan submajstron murdis nek mia plej juna, nek la alia frato, sed estas mi, kiu **faris** <u>tiun</u> **murdon**.
30. Sed apenaŭ ni **faris** <u>kelkajn dekojn da</u> **paŝoj**, ni haltis, rigidigitaj de teruro.

31. Li kaj lia amiko jam priparolis ĉion kaj jam delonge **faris** en la konversacio longajn **paŭzojn**, nur frapetante unu la alian je la femuroj kaj dirante...
32. Ekvidinte la naĝantojn, ŝi **faris** vokan **signon**, infanece fleksante la fingrojn de la malfermitaj manoj.
33. Farinte la taskon li **faris** profundan **spiron** kaj ekiris.
34. La 23-an ĉi-monate, itala ĉefministro Romano Prodi atingis afganan ĉefurbon Kabulon kaj **faras** subitan **viziton** al Afganio.
35. Ie tie supre, se kredi la agoniajn vortojn de ŝippereulo, kiu **faris** la timindan tralandan **vojaĝon**, kaj se veron atestis la flakono da oraj grajnoj...

Estas taŭge esplori pli detale unu el la plej oftaj esprimoj en la tekstaro: *fari + demandon*. Ekzistas pluraj manieroj tion diri en Esperanto. Kvar esprimoj konkurencas en mia tekstaro: *fari demandon* (38 okazaĵoj), *starigi demandon* (38 okazaĵoj, la ekvivalento de la franca *poser, soulever une question*, aŭ la germana *eine Frage stellen*), *meti demandon* (15) kaj *levi demandon* (8 okazaĵoj). La diferenco inter la PK-esprimo kaj la 'normala' simpla predikato *demandi* (kiu estas multe pli ofta: pli ol 971 okazaĵoj kiel aktiva verbo) estas, ke la simpla verbo uziĝas en pli vasta tipo de gramatikaj strukturoj, ekzemple kun rekta demando (36), nerekta demando (37), komplementa propozicio (38), rekta plus nerekta komplemento (39), kaj refleksivo (40). En ĉi tiuj kontesktoj, la demando estas kutime mensa ago, aŭ priskribo de konversacia ago en evoluanta rakonto:

36. - Ĉu vi kontraŭas, ke mi rigardu vian registrolibron? - **demandis** Holmso.
37. La dua parolanto ne demandas, ĉu la unua estas barono Brambeus.
38. Enirinte en karavanejon, li tuj **demandis**, **kiam** komenciĝos la sklavovendado...
39. Pri tio Cindrulino ŝajnigis sin tre indiferenta; ŝi ja **demandis ilin pri** la nomo de la reĝidino; sed ili diris al ŝi, ke ili ne scias tion...
40. Nu, kion mi havas, fakte? - li **demandis sin**, pluen anhelante kaj stumblante.

Se oni observas la tipajn kuntekstojn de *fari demandon* oni vidas, ke la gramatikaj strukturoj estas similaj sed la procezoj signitaj estas pli specifaj; oni 'petas permeson':

41. La Princo ekprenis la skatolon, kaj malfermis la buŝon por **fari** alian **demandon** ; sed, antaŭ ol li povis eligi unu solan vorton […].
42. "Sed, Baptopatrino, mi petas, ĉu mi povos **fari** al vi unu **demandon**?" "Se ĝi estas mallonga," respondis la incitema maljunulino, "kaj ne tro malsaĝa."
43. La Maljunulo respondis pli frue, ol Sehei sukcesis **fari demandon**.
44. En unu kunveno esperantista iu **faris** la **demandon**, ĉu oni devas diri: "mi amas vin", aŭ "mi vin amas", […].
45. Ili **faris** la **demandon**, ĉu ili povas partopreni.

La PK-esprimo *starigi demandon* signifas mensan procezon pri problemo, pli ofte ol peto aŭ komunika demando. La komplemento estas ofte post-modifita de relativa propozicio aŭ prepozitiva sintagmo (oni pli ofte *starigas demandon pri* prefere al *fari demandon pri...*):

46. "Ĉu vi sentis timon?" mi diris, **starigante** la **demandon** kiun virinoj ofte starigas, kaj ricevante la respondon kiun preskaŭ ĉiam ili ricevas.
47. […] li ŝancelis la kapon, faligis la brakojn nervoze sur la genuojn kaj sidis tie sensone, **starigante** la **demandon** jam starigitan en horoj malpli malhelaj […].
48. Se li rapidis, tio **starigas** interesan **demandon**, kial li estis tiel rapidema […].
49. …nia lando estis la unua, kiu ankoraŭ en 1946 **starigis** la **demandon** pri malpermeso de produktado kaj uzo de atoma armilaro […].
50. La romano ja **starigas demandojn** pri la universo kaj ties enloĝantoj, sugestas plurajn respondojn, sed lasas, ke la legantoj plu meditu.

La esprimo *meti demandon* estas tre malofta, sed ĝi ŝajnas referenci regule al kvazaŭ-oficialaj petoj 'sub'-metitaj al iu instanco aŭ alia specifa decidanto:

51. Mi **metis demandon** al la grupo pri la aervorticoj kaŭzintaj la lastnovembran katastrofon de aviadilo proksime al la aerhaveno…
52. Tio povas okazi ekz. tiamaniere, ke la komputilo **metas demandon** al la uzanto de la komputilo, kiam estiĝas dubaĵo, atendas respondon kaj daŭrigas la...
53. En la pasinta numero de "Japana Budhano"(n-ro 298) s-ino KOBAYASI **metis demandon**, ĉu budhismo malpermesas sinmortigon aŭ ne.
54. Antaŭ la fiasko de tiu ciklo, multaj **metis la demandon**: per kio anstataŭigi Dohon?
55. Mi **metis demandon** sur la reton antaŭ du monatoj, sed ricevis nur du respondojn.

Fine la esprimo *levi demandon* estas tre malofta. Ĝi ŝajnas referenci al pli abstraktaj punktoj. La *demando* reprezentas paŭzon aŭ transiran signalon en la teksta argumento:

56. Lingvoj **levas** ankaŭ la demandon pri valoroj, temas esence pri filozofia diskutado, pri toleremo kaj komprenemo.
57. Tiu ĉi scikono de sia tuto **levas** du demandojn.
58. Parenteze, oni povus **levi** la **demandon**: Kial SAT-anoj […] malsimpatias al modernaj artformoj?
59. Mi **levas demandon** pri administro de TTT-paĝoj, i.a. de UEA.
60. Tiuj procesoj **levis** ŝlosilajn **demandojn**.

Ĉi tiuj ekzemploj montras la principon, ke esprimoj evoluigas tre specifajn funkciojn, ofte kun tre fajnaj semantikaj diferencoj sed ankaŭ tre regulaj leksiko-gramatikaj ŝablonoj.

### 5.3 PK-esprimoj kun la verbo *havi*

Oni povus ĝis nun resumi, ke PK-esprimoj kun *doni* kaj *fari* ofte esprimas pli specifajn sencojn ol siaj simplaj ekvivalentoj. En ĉi tiu sekcio, mi sugestas, ke PK-esprimoj kun *havi* ludas tre specifan rolon en la gramatika strukturo de la frazo. En la plimulto de la kazoj,la komplemento de *havi* esprimas abstraktan 'faceton' pri sekvanta predikato, kiu havas la ĉefan predikatan funkcion en la propozicio. La ĝenerala senco de ĉi tiu konstruaĵo estas komuniki la vidpunkton de la lingvouzanto pri la aserta valoro de la frazo. Ekzemple, oni komparu la simplan predikaton *devas,* kiu esprimas 'aktualan' devon en (61), kun la PK-esprimo *havas la devon*, kiu esprimas 'virtualan' devon en (62):

61. AGNESO : – (al si mem) Mi **devas** <u>agi</u> lerte (laŭte) Vi […]. (kun ideo) Ha!
62. Se Membroŝtato estas la viktimo de armita agreso sur sia teritorio, la aliaj Membroŝtatoj **havas la devon** <u>helpi</u> kaj asisti ĝin per ĉiuj rimedoj je ilia dispono, laŭ Artikolo 51 de la Ĉarto de […].

En (61), la predikato estas modifita de gramatika verbo, la 'modalo' *devas*, kaj la principa verbo estas *agi*. La modalo ĉi tie ne esprimas semantikan procezon, konsekvence la subjekto *mi* povas esti konsiderata kiel la aganto de la sekvanta predikato, kiu ĉi tie esprimas materian procezon (*agi*). Kontraste, en (62) la subjekto estas referencanto de la unua predikato, kiu esprimas rilatan aŭ 'posedan' procezon (*havi*), dum la dua predikato mem esprimas materian procezon (*helpi*). Oni povas konstati similan serion da kontrastoj kun la triopo: *havi la eblon / havi la eblecon / ebli*. En (63) la simpla verbo *ebli* estas uzata kiel 'modalo' en nerekta strukturo. Dume, la PK-esprimoj *havi la eblon / eblecon* esprimas virtualan atribuon de la subjekto:

63. Ne **eblas** <u>trotaksi</u> la rolon de ekonomiaj normoj.

64. La gazetoj ne trovas necesa eniĝi en tion, pri kio ili skribas, kaj kontentiĝas nur per tio, ke ili **havas la eblon** regali la legantojn per ridinda novaĵo aŭ fari spritaĵon.
65. Dum lia vizito, preskaŭ 20 lokaj esperantistoj **havis la eblecon** renkontiĝi kaj paroli kun li dum vespermanĝo ĉe la korea restoracio NY Kom Tan.

Mi ne ripetas la samajn komentojn por la sekvantaj ekzemploj, ĉar kiel oni vidas en la sekvanta konkordanco, ĉiu PK-esprimo kun *havi* en Esperanto havas simplan ekvivalenton, kiu estas verbo kun la senco 'aktuala, dinamika perspektivo', dum la PK-esprimo enkondukas strukturon kun la senco 'virtuala, statika perspektivo':

66. Sed mi ne **kapablas** forgesi ilin, fraŭlino Stepeltono, – mi diris.
67. Kvankam la juna virino poste mortis, ŝi **havis la kapablon** forlasi sian tombon nokte kun la celo suĉi la sangon de aliaj personoj.
68. Li **intencis** fine akiri la bienon, kaj li pretis uzi iun ajn ilon aŭ riski ion ajn tiucele.
69. Mi **havas la intencon** prezenti al la Akademio projekton de regularo pri la tri jenaj punktoj : […].
70. La sekvan tagon la konsilisto estis tre gaja kaj neniu **kuraĝis** demandi lin pri la okazintaĵo de la nokto.
71. […] malgraŭ la diktaturo de la nuna prezidento Pervés Muŝarraf, apogita de Usono, ŝi **havis la kuraĝon** reveni al sia lando,...
72. Kiam Kruko estas en kompanio de pluraj homoj, li **kutimas** demandi : – ĉu vi aŭdis pri la nova bordelo en la X-strato ?
73. La amerikano ekzemple **havas la kutimon** meti tuj sub la nomo de la adresato la straton kaj numeron, […].

En Gledhill (2008b, kie mi unue prezentis ĉi-tiun analizon), mi sugestis, ke kvankam la PK-esprimoj en tiuj ekzemploj originis en lingvoj kiel la angla kaj la franca, tiuj lingvoj tamen ne posedas simile riĉan kaj regulan kontraston inter 'simplaj' kaj 'kompleksaj' predikatoj . Analizistoj pri kompara lingvistiko kaj pri kreolaj lingvoj ne surpriziĝos pri tia disvolviĝo de produktivaj konstruaĵoj. Sed mi dubas, ke ekster Esperantio multaj suspektus, ke ankaŭ en 'artefarita lingvo' la samaj procezoj de lingvo-uzado plene funkcias...

## 6 Konkludo

La unua celo de ĉi tiu artikolo estis, proponi ĝeneralan kadron por analizi 'predikato-komplemento-esprimojn' en Esperanto (ekz. *fari demandon, havi efikon sur, ĵeti rigardon...*) Sed dua, pli teoria celo estis, kontrastigi la tradician perspektivon pri 'frazeologio' kaj 'frazeologiaĵoj' al la vidpunkto de la britaj funkciaj lingvistoj J.R. Firth (1957) kaj M.A.K. Halliday (1985). Specife, Firth proponas, ke lingvo-uzantoj uzas signojn en regulaj sinsekvoj da signoj, kies signifo ne dependas de la kombinado de individuaj sencoj, sed de la 'kunokazemo', t.e. ilia konvencia kunteksto de uzado. Simile Halliday argumentas, ke ĉiu signo havas sian kutiman 'leksiko-gramatikan' profilon, t.e. tipan sintagman kuntekston. La fakto, ke fluaj lingvo-uzantoj povas interpreti nekutimajn kaj provajn kunokazaĵojn, montras ke ili bone konas la tipajn leksiko-gramatikajn ŝablonojn de la lingvo, kaj la produktiveco de tiuj ŝablonoj permesas al ili kohere konstrui novajn sinsekvojn da signoj. Kompreneble, se oni konsideras signojn nur intuicie, ilia tipa leksiko-gramatika konduko ne estas facile videbla. Sed en la antaŭaj sekcioj mi montris, ke se oni esploras grandan tekstaron, oni povas sisteme observi la tipan konduton de signoj kaj sintagmoj, specife kiam oni komparas ilin kun iliaj kvazaŭ-sinonimoj (*demandi, fari demandon, starigi demandon* ktp). Intuicie, oni povus supozi, ke la sola diferenco inter tiuj esprimoj estus ilia stila nivelo. Sed oni povas observi en

la tekstaro, ke ĉiu esprimo fakte posedas malsaman, sed ankaŭ tre precizan kaj regulan komunikan funkcion.

La ideo, ke Esperanto havas regulan frazeologion povas ŝajni tute natura, sed la ekzisto de absolute regulaj leksiko-gramatikaj ŝablonoj ne estas evidentaĵo. Oni povas sin demandi, ekzemple, kiel evoluis pli-malpli stabila leksiko-gramatiko en lingvo, kies parolantoj estas plejparte ne-denaskaj, plurlingvaj, kaj kiuj ne konas precize la samajn instituciajn restriktojn, kiuj ekzistas por tradiciaj lingvo-komunumoj. Unu respondo sendube estas 'socia' fakto pri internacia komunikado kaj diskurso-komunumoj: en la realo, diskursoj vojaĝas preter la tradiciaj limoj de lingvo-komunumoj (mi pensas pri *administracio, filozofio, komerco*, *religio, scienco* kaj aliaj lingvaj agadoj kaj ideologioj). Neeviteble, tiuj diskursoj formas siajn proprajn lingvajn trajtojn. Kaj ĉar esperantistoj ĉiam estis kaj ankoraŭ estas 'kosmopolitaj poliglotoj', oni povas kompreni, kiel komunaj diskurso-modeloj konverĝis kaj ankoraŭ konverĝas en nia lingvo. Sed tiu rimarko kondukas min al dua faktoro: diskurso-modeloj evidente respondas al leksiko-gramatikaj ŝablonoj. Kiam lingvistoj studas tiujn sinsekvojn, ili devus ne nur studi iliajn formojn sed ankaŭ iliajn funkciojn. Ĉar kontraŭe al tio, kion pensus kelkaj analizistoj, la vera celo de lingvisto ne estas studi formojn por klasigi aŭ apartigi ilin, sed studi la tre gravan ligon inter la formoj kaj la funkcioj de homa komunikado.

## Bibliografio

Allerton, David (2002): *Stretched Verb Constructions in English*. London: Routledge.

Bolinger, Dwight (1968): *Aspects of Language*. New York: Harcourt Brace.

Burger, Harald (1998): *Phraseologie. Eine Einführung am Beispiel des Deutschen*. Berlin: Schmidt.

Cowie, Anthony (1981): "The Treatment of collocations and idioms in learners' dictionaries." En: *Applied Linguistics* 2(3), p. 223-235.

Dasgupta, Probal (1993): "Idiomaticity and Esperanto texts : an empirical study." En: *Linguistics*, 31(2), p. 367–386.

Fiedler, Sabine (1998): *Plansprache und Phraseologie: Empirische Untersuchungen zu* reproduziertem Sprachmaterial im Esperanto. Habilitationsschrift. Leipzig : Universität Leipzig, Philologische Fakultät.

Fiedler, Sabine (1999): Plansprache und Phraseologie: Empirische Untersuchungen zu reproduziertem Sprachmaterial im Esperanto. Frankfurt/Main: Peter Lang.

Fiedler, Sabine (2002): *Esperanta frazeologio*. Rotterdam: Universala Esperanto Asocio.

Firth, John Rupert. (1957): *Papers in linguistics 1934-1951*. Oxford: Oxford University Press.

Firth, John Rupert (1968): "A synopsis of linguistic theory, 1930-1955", kaj "Linguistic analysis as a study of meaning." En: Frank R. Palmer (red.): *Selected papers of J. R. Firth 1952-1959.* London: Longman, p. 168-205.

Gledhill, Chistopher (2008a): "Portée, Pivot, Paradigme: trois termes pour faire le point sur les expressions verbo-nominales." En: Pierre Frath (red.): *Zeitschrift für Französische Sprache und Literatur. Beihefte 35*, p. 59-76.

Gledhill, Christopher (2008b): "Les constructions verbo-nominales en français et en espéranto: un cas spécifique de 'glissement phraséologique'." En: Peter Blumenthal & Salah Mejri (eds.): *Zeitschrift für Französische Sprache und Literatur. Beihefte 36*, p. 71-84.

Gledhill, Christopher (1998 / 2000): *The Grammar of Esperanto – A Corpus-Based Description*. München: Lincom Europa.
Gledhill, Christopher / Pierre Frath (2007): "Collocation, phrasème, dénomination: vers une théorie de la créativité phraséologique." *La Linguistique* 43 (1), p. 65-90.
Gledhill, Christopher / Pierre Frath (2005): "Free-Range Clusters or Frozen Chunks? Reference as a Defining Criterion for Linguistic Units." *Recherches anglaises et Nord-américaines* 38, p. 25-43.
Gonzalez-Rey, Isabel. (2002): *La Phraséologie du français.* Toulouse: Presses Universitaires du Mirail.
Gross, Gaston (2005): "Pour une Bescherelle des prédicats nominaux". En: Gross, Gaston / Pontoux, Sophie de (red.): *Verbes supports: Nouvel état des lieux* (Linguisticae Investigationes, 27 / 2), p. 343–358.
Halliday, Michael A. K. / Matthiessen, Christian (1985 / 2004): *An Introduction to Functional Grammar*. London: Arnold.
Herrlitz, Wolfgang (1973): *Funktionsverbgefüge vom Typ 'in Erfahrung bringen'. Ein Beitrag zur generativ-transformationellen Grammatik des Deutschen*. (Linguistische Arbeiten 1). Tübingen: Niemeyer.
Howarth, Peter (1996): *Phraseology in English academic writing*. (Lexicographica Series Maior 75). Tübingen: Max Niemeyer.
Jespersen, Otto (1924): *The philosophy of grammar*. London: George Allen & Unwin.
Kalocsay, Kálmán / Waringhien, Gaston (1985): *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*. 5-a eldono. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
Lo Jacomo, François (1981): *Liberté ou autorité dans l'évolution de l'espéranto*. Pisa : Edistudio.
Mjasnikov, Leonid (1989): *Principy stanovlenija i razvitii frazeologii v esperanto i v etničeskich jazykach (anglijskom, vengerskom, nemeckom, russkom, francuskom)*. Moskovo : Ŝtat-universitato.
Pottelberge, Jeroen van (2000): "Light verb constructions: What they are and what they are not." En: *Logos and Language* 1(2), p.17-33.
Ruiz, Leonor (1998): *La fraseología del español coloquial*. Barcelona: Ariel.
Saussure, Ferdinand de. (1916 / 1987): *Cours de linguistique générale*. Paris: Payot.
Storrer, Angeliker (2006): "Corpus-based investigations on German support verb constructions." En: Fellbaum, Christiane (ed.): *Collocations and Idioms: Linguistic, lexicographic, and computational aspects*, London: Continuum Press, p. 164-187.
Vinogradov, Viktor V. (1947 / 1977): "Ob Osnovnich tipach frazeologičeskich edinits v russkom jazyke." En: A. A. Šakmatov (red.), 1864-1920. Sbornik statey i materialov, 339-364. Moskva: Nauka.
Vivès, Robert (1984): "L'Aspect dans les constructions nominales prédicatives: avoir, prendre, verbe support et extension aspectuelle." *Linguisticae Investigationes*, 3(1), p. 161-185.
Waringhien, Gaston / Duc Goninaz, Michel (1968 / 2002): *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*. Paris: Sennacia Asocio Tutmonda.
Wierzbicka, Anna (1982): "Why can you have a drink when you can't have an eat?" *Language*, 58, p. 753-799.
Woolf, Felix (1962 / 1982): *English phrases and expressions in Esperanto*. Ballieboro, Ontario: Esperanto Press.

**Christopher Gledhill,** * 1968. (gledhill@umb.u-strasbg.fr), lekciisto pri angla lingvistiko ĉe la Universitato de Strasbourg, Francio, doktoriĝis en Birmingham, Anglio, 1995 (pri

kunokazaĵoj en sciencaj tekstoj). Habilitiĝis en Brest, Francio, 2008 (pri frazeologio kaj leksiko-gramatiko). Iama universitata lekciisto pri franca lingvistiko ĉe Aston (Anglio) kaj St. Andrews (Skotlando). Eks-voluntulo de UEA, prezidinto (honora) de la *Skota Esperanto-Asocio*, verkinto de *The Grammar of Esperanto* (Lincom Europa), kaj tradukinto kun William Auld de *La Hobito* (Sezonoj).